

**VERDA INFORMILO, n-ro. 3/2015, 26a de  
majo 2015**

**GRÜNER BOTE, 03/2015, 26. Mai 2015**

**estas la oficiala informilo de estraroj de Landa Asocio  
Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA) kaj Esperanto-Societo  
Neubrandenburg (ESN)  
ist das offizielle Mitteilungsblatt der Vorstände des LVMV und  
EVN  
www.esperanto-nb.de, [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)**

## **1. Leserbriefe / Legantoleteroj**

*El Kubo:*

Gonzalo staras en la mezo. Roberto dekstre en blanka T-ĉemizo, apud Vilhelmo.  
Tiuj tri amikoj ĉiutage laŭvice zorgis pri Venero en la kliniko.



*El Pollando:*

Dankon por la informoj.

Mi enhavigas la ligilon al mia retejo pri la iniciato pri Radio Romo en Esperanto:

<https://plus.google.com/101924880032402005905/posts/2y69bbmYfeP>

Esperanto kaj Radio Romo: oni ciferigas la arkivon de 70 jaroj de radio-elsendoj

Amike

Andreo

## 2. Mesaĝo el Kubo

*Nin atingis la jena informo el Kubo:*

Estimataj gekolegoj!

La Estraro de Kuba Esperanto-Asocio anoncas la okazigon de la

6-a Kongreso de KEA  
18-22 novembro 2015  
Havano, Kubo

Kongresa temo: Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco.

Ni planas la partoprenon de 150 aktivaj kubaj geesperantistoj en reprezento de ĉiuj filioj kaj grupoj de KEA, kaj kompreneble, ni tre esperas pri la partopreno de eksterlandaj gesamideanoj, sen kiuj la kongreso ne spertos tiun apartan kaj unikan guston de internacieco.

La kongresejo estos la sidejo de la Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruinĝenieroj de Kubo, organizaĵo kun kiu KEA de kelkaj jaroj tenas kunlaborajn rilatojn, situanta en la moderna parto de Havano, tre facile atingebla el la tuta urbo.

Ni tre dankas la helpon por diskonigi tiun ĉi alvokon kaj plaĉe restas je dispono por respondi al demandoj de interesitoj.

Jen ligilo al la Kongresa Bulteno:

[https://dl.dropboxusercontent.com/u/1107821/6kongreso\\_kea\\_kongresa\\_bulteno.pdf](https://dl.dropboxusercontent.com/u/1107821/6kongreso_kea_kongresa_bulteno.pdf)

Laŭpete ni tre volonte sendos ĝisdatigon de la kongresaj preparlaboroj kaj programo.

A

mikan saluton en la 47-a Semajno de Internacia Amikeco!

Alberto F. Calienes

## 3. Esperanto-Bibliothek in Aalen

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p.a. Karl Heinz Schaeffer

Schulstr. 17

73432 Aalen

*Sendis la jenan mesaĝon:*

Estimata s-ino Dallmer!

Ich habe heute Ihr unerwartetes Paket mit für uns wertvollen Büchern ordentlich und mit Dank erhalten.

Es ist schön, dass Sie an unsere Bibliothek gedacht haben und diese Bücher nun nicht dem

Papiermüll anheim fallen, wie Sie so nett geschrieben haben. Unser Ziel ist es, Titel, die wir noch nicht zwei- bis dreimal besitzen, für die Zukunft zu konservieren und darüber hinaus erhaltene Titel besonders zu lagern, um sie anderen Esperanto-Bibliotheken zu überlassen. Das hat sich sehr bewährt und zwar im doppelten Sinne, da auch wir vom Büchertausch Vorteile haben.

Es tut mir sehr leid, dass Ihre Krankheit Sie an Ihren Esperanto-aktivitäten hindert, aber uns haben Sie mit Ihrer Sendung eine große Freude gemacht.

In diesem Sinne wünsche Ich Ihnen nach Möglichkeit alles Gute.

Kun koraj salutoj restas

Karl Heinz Schaeffer

afergvidanto de GEB



*Abbildung 1: In diesem Gebäude, dem Torhaus in Aalen, befindet sich unsere Bibliothek*



*Abbildung 2: Hier sehen Sie meine Frau und mich als zwei von fünf Mitarbeitern der Bibliothek.*

Ni aliĝas al la bondeziroj por s-ino Dallmer.

## 4. Ondo Esperanto

*Vernereto skribis:*

Die Themensendung beschäftigte sich mit dem "Tag der Mutterspache", der alljährlich unter dem Schirm der Unseco begangen wird. Von den ca. aktuell 7.000 praktisch genutzten Sprachen sind derzeit 2 bis 3 tausend von Aussterben bedroht.

Zu Gast war Herr Willi Behnick von der Bürgerinitiative für mehr deutsche Sprache im öffentlich-rechtlichen Rundfunk. Diese neu gegründete Initiative im Land MV schon eine Menge bewegt und ist derzeit damit beschäftigt, ihre Basis zu verstärken und ein Netz von ähnlichen Gruppen im gesamten Bundesgebiet zu schaffen.

Stefan brachte einen Überraschungsbesuch mit, Mohamed aus Mauritien, er ist Asylbewerber und wohnt in der Nähe von Neubrandenburg. Auf Grund seiner Sprachkenntnis (Stefan beherrscht acht Sprachen) hilft er gerne bei den Sozialeinrichtungen als Dolmetscher aus. WP



*Abbildung 3: René, Werner und unserer Gast, Herr Willi Behnick*



*Abbildung 4: René, Werner und unserer Gast, Herr Willi Behnick*

## 5. Ausflug nach Stettin

Saluton, karaj geamikoj,

schon vor einigen Wochen habe ich die Einladung (Anhang) versandt, um Interessenten über das gesamte Treffen zu informieren.

Unserer Freude aus Stettin haben uns mit einem drei-Tage-Programm überrascht, einige unserer Runde werden an allen Tagen am Frühlingstreffen teilnehmen.

Aber für den Sonnabend, dem **18. April 2015** laden wir für einen Tagesausflug ein.

Bitte schaut Euch das Programm vom Sonnabend an, es beginnt mit einem Frühstück in der Gaststätte "Zamkowa" auf der Burg der Pommersche Herzöge (Pomeriaj Princoj) in der Straße Rycerska 3.

Danach Schiffsausflug auf der Oder, Besuch der Wallanlagen der Burg und andere tolle Sachen.

Die Neubrandenburger fahren per Eisenbahn:  
Hauptbahnhof NB ab: 07.25 Uhr  
an Stettin, Hauptbahnhof: 08.54 Uhr.

Dort Geldumtausch von Euros in Zloty und per Auto zur Burg.

Rückreise, wenn nicht basisdemokratisch anders entschieden:

ab Stettin Hauptbahnhof: 17.00 Uhr,  
an Neubrandenburg: 18.27 Uhr.

Wir kaufen eine Gemeinschaftsfahrkarte und bitten Euch umgehend um verbindliche Anmeldung.

Alle Kosten werden individuell getragen.

Ĝis baldaŭ und herzliche GrüÙe

Brunhilde Pfennig  
0395 422 13 98 (AB)  
vorstand@esperanto-nb.de

## 6. UEA petas

*Nin atingis el Rotterdam:*

Por memorfesti la 30 jarojn ekde la UNESKO Rezolucioj de 1985, kiu instigis internaciajn neregistarajn organizojn (NRO) uzi Esperanton inter NRO-j kaj UNESKO, ni invitas internaciajn NRO-jn relegi la UNESKO Rezolucion kaj inkluzivi Esperanton en siaj retejoj.

Por tiuj kiuj inkluzivis Esperanton en siaj retejoj, dankon pro via ago de respekto al la mondo korpo, UNESKO.

Tiujn internaciajn neregistarajn organizojn kiuj faris rezolucion por subteni la uzon de Esperanto ni rememorigas honori vian rezolucion.

UNESKO Rezolucio 1985 deklaris:

Internaciaj Neregistaraj Organizoj kiuj faris rezolucion por subteni la uzon de Esperanto estas:

Legu ĉi tie

<http://www.uea.org/teko/rezolucioj>

## 7. PRINTEMPAS en Gresillon

*Atingis nin:*

Karaj lernantoj,

Mi atentigas vin : printempo jam komenciĝis!

Ne prokrastu vian aliĝon al la studperiodo kiu permesas al vi lerni efike Esperanton, kaj prepari vin por interŝanĝi kontentige kun la multaj eksterlandanoj kiuj vi renkontos en Lille somere.

Ni provos trejni vin por diskuti, debati, ktp... por ĝui plene Universalan Kongreson.

Eĉ se vi ne intencas partopreni UKon, vi certe volos uzi Esperanton dum internacia renkontiĝo ĉu ne?

Vizitu nian retpaĝon <http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=eo> kaj aliĝu aŭ por la studperiodo aŭ por la ekzameno KER.

Kore  
Jannick Huet

## 8. ĈEA-Retkomunikoj

*Nin atingis el Ĉeĥujo:*

ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO
3. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ
4. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ
5. NOVAĴOJ EN PAĜO DE ESPERANTO-MUZEJO EN SVITAVY ĈE LA SOCIA RETEJO IPERNITY
6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
7. LISTO DE ARANĜOJ

### 1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Pasis jam kelkaj monatoj, kiam mi decidis finfine denove sidiĝi al mia portebila komputilo kaj komenci skribi novan numeron de ĈEA-Retkomunikoj. Origine mi planis dissendi la numeron antaŭ Kristnasko, sed pro studaj devoj mi decidis iom atendi. Espero krei la numeron baldaŭ post Kristnaskaj festoj ankaŭ ne estis efektiva, studado estis pli grava. Tamen finfine la tempo venis kaj do vi povas legi novan, unuan numeron de ĈEA-Retkomunikoj en la jaro 2015.

Do, agrablan legadon!

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-Retkomunikoj, se ne nepre necesas.

Estu amiko de la naturo!

### 2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato KUN KOLORAJ FOTAĴOJ elŝuteblas ĈI TIE: <http://www.esperanto.cz/soubory/retkomunikoj-2015-1.pdf>

ARKIVO de Retkomunikoj troveblas ĈI TIE: <http://www.esperanto.cz/eo/cxea-interne/arkivo-de-retkomunikoj> .

### 3. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ

#### 3.1 Invito al paradizo

Nome al Paradizo Bohemia norde de Prago, al la pensiono ESPERO (<http://home.tiscali.cz/penzionespero/esperanto/espindex.htm>) en Skokovy, kie okazos samtempe du

jam tradiciaj klerigaj aranĝoj: 21.-26.4. la 41-a LINGVA SEMINARIO, organizata de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kunlabore kun E-rondeto Mladá Boleslav (20.-26.4.) kaj la 10-a interreta seminario SABLĀ PRINTEMPO, organizata de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun E-klubo Písek (23.-26.4.). En familia etoso kaj en ĉarma naturmedio atendas vin antaŭtagmeza instruado (ĉu lingva konversacio, ĉu trejnado de voĉo kaj realigo de voĉregistraĵoj), posttagmezaj ekskursoj, promenoj kaj artaj atelieroj kaj vesperaj programoj (prelegoj, ludoj, filmprojekciadoj, kantado k.a.).

Prezo 420,- CZK por tranokto (en 2-maks.4litaj ĉambroj kun lavujo kaj komunaj necesejoj/duŝejoj) kaj 3 manĝoj/popersonoj kaj tage, programkotizo nuraj 100,-200,-CZK (laŭ daŭro de restado) ebligas partoprenon en programo de ambaŭ aranĝoj laŭplaĉe. Aliĝilojn kaj pliajn informojn vi trovos en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) en KALENDARO DE ARANĜOJ. Jen fotogalerio de la aranĝoj kaj de la okazloko: <http://muzeum.esperanto.cz/eo/galerio/40-seminare-v-penzionu-espero-v-ceskem-raji-seminarioj-en-la-pensiono-espero.html> Kontaktoj : [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz) (Lingva seminario) kaj [pavla.dvorakova@esperanto.cz](mailto:pavla.dvorakova@esperanto.cz) (SablĀ Printempo). Ni volonte konsilos vin pri taŭga trafikonekto. Bv. aliĝi plej malfrue ĝis la 31-a de marto 2015! Ni antaŭgigas atedante vin!

### 3.2 Esperanto-muzeo partoprenas en la internacia filmkonkurso

Ĉina Radio Internacia iniciatis internacian konkurson pri mallongaj filmoj, origine verkitaj en Esperanto, pri la temo "AMO KAJ TEO". Ĝis fino de novembro 2014 kolektiĝis ĉirkaŭ 50 filmoj el la tuta mondo - inter ili ankaŭ 10minuta filmeto, kreita de membroj de Klubo de amikoj de Esperanto Svitavy. Komence de februaro faka komisiono jam elektis 10 plej bonajn videojn. Tamen ĜIS FINO DE MARTO la filmojn povos prijuĝi ankaŭ vasta publiko (do ankaŭ vi!) pere de interreta voĉdonado - la plej sukcesaj ricevos valorajn premiojn. Krome ankaŭ ĉiu voĉdonanto havas la ŝancon ĉiusemajne esti lotumita kaj ricevi donacon simbolantan la ĉinan kulturon!

La filmon de la svitava klubo vi povas rigardi ĈI-TIE: <https://www.youtube.com/watch?v=ShltWvCay8w>

Se vi volas subteni la filmon kaj kaj la muzeon, vi povas doni al ĝi vian voĉon! Kiel? En <http://esperanto.cri.cn/filme/14tea3.htm> en listo de konkursaĵoj la filmo estas en la sesa linio maldekstre (vi trovos ĝin laŭ fotaĵo de Esperanto-Muzeo, resp. de la Ottendorfer-Domo). Vi klakos al la suba kadreto signante ĝin. Tute sube de la sama paĝo vi notos vian nomon kaj retadreson (la aliaj indikoj estas NEdevigaj) kaj klakos al "SENDU". Sur la supre menciita retpaĝo vi povas spekti ankaŭ aliajn konkursajn filmojn. Dankon por via eventuala subteno! Ĝu sendube helpos fortigi prestiĝon de la muzeo (kiu estas ja ankaŭ sidejo de nia asocio!) en okuloj de la urbaj instancoj (oni jam skribis pri la konkurso en la gazeto Svitavský deník ([http://svitavsky.denik.cz/kultura\\_region/esperantiste-soutezi-o-nejlepsi-snimek-0115-20150113.html](http://svitavsky.denik.cz/kultura_region/esperantiste-soutezi-o-nejlepsi-snimek-0115-20150113.html))). Ligi fizikan viziton de la muzeo kaj de ĝia nuntempa ekspozicio "Esperanto kaj kolektado" kun Esperanto-aranĝo vi havas la okazon kadre de la REGIONA RENKONTIĜO SABATE LA 25-AN DE APRILO 2015. Antaŭtagmeze vizito de la renesanca kastelo en Moravská Třebová, post alveturo al Svitavy kaj komuna tagmanĝo vojaĝprelega kaj amuza programo en la muzeo. Pliaj informoj haveblas ĉe: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz). Vi estas elkore invitataj!

### 3.3 Retradio Muzaiko - por vi, por via familio

Aŭskultu Muzaikon por aŭdi Esperantajn voĉojn el la tuta mondo. Muzaiko estas sendependa retradio en Esperanto, kiu elsendas dum 24 horoj ĉiutage. Muzaiko estas komunuma retradio, sekve se vi ŝatus, ke la aliaj aŭdu vian voĉon, skribu al [info@muzaiko.info](mailto:info@muzaiko.info). Parolu, intervjuu por Muzaiko por vigligi la tutmondan E-komunumon!

Aŭskultu, kunkreu ankaŭ vi tiun movadaĵon, kiu ekde pli ol tri jaroj senĉese funkcias. Skribu al [info@muzaiko.info](mailto:info@muzaiko.info) por helpi kaj aŭskultu ĝin ĉe [muzaiko.info](http://muzaiko.info)!

#### 4. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

Ni invitas vin al regulaj vizitoj ĉe <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality> kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

Artikoloj en esperanto en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)

Suplemento al Nova retligilaro pri d-ro Zamenhof

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/suplemento-al-nova-retligilaro-pri-d-ro-zamenhof.html>

En decembro 2010 ni aperigis en tiu ĉi rubriko referencan artikolon Nova retligilaro pri d-ro Zamenhof, kiu vekis sufiĉe grandan internacian reeĥon kaj ĝis nun vizitis ĝin pli ol 9 600 personoj. Omaĝe al la naskiĝtago de d-ro Zamenhof ni prezentas al vi nove kompilitan liston, kiu inkluzivas elekton el la trovitaj novaĵoj aperigitaj en Interreto plejparte en la jaroj 2011–2014. Se vi scias pri plia kvalita kaj utila dosiero, ne hezitu informi nin pri la koncerna ligilo pere la de komentaria formularo. Disvastigo de tiu ĉi artikolo tra Esperantujo estas dezirinda kaj bonvena!

Novaj fotogalerioj en la muzea retejo

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/novaj-fotogalerioj-en-la-muzea-retejo.html>

Ni ofertas al vi fotogalerion el la inaŭguro kaj elekton de la ekspoziciaĵoj de la nova tema ekspozicio „Esperanto kaj kolektado“, okazinta en Esperanto-Muzeo Svitavy la 27-an de septembro 2014, kaj samtempe ilustran virtualan kolekton „Famaj esperantistoj kaj favorantoj de Esperanto sur kolektematerialoj“ (poŝtmarkoj, bankbiletoj, moneroj, medaloj).

Interesa prelego pri interreta trompado

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/interesa-prelego-pri-interreta-trompado.html>

Kiel vi ŝajne scias de la novaĵo, kiu aperis en majo en nia retejo, Esperantista klubo en Brno kaj Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno komune publikigas multajn prelegojn, kiuj okazis en la kluboj. Hodiaŭ ni ŝatus informi vin pri alia interesa kaj utila prelego.

Preparatas kurso de Esperanto sur retejo Duolingo

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/preparatas-kurso-de-esperanto-sur-retejo-duolingo.html>

En la epoko de interreto naskiĝas novaj eblecoj por ricevado de informoj, por komunikado, sed ankaŭ por lernado. Oni povas per interreto lerni per virtualaj e-kursojn multajn diversajn temojn, inter alie lingvojn. Inter esperanta komunumo estas konata projekto lernu!, sed dume naskiĝas aliaj paĝoj por lerni naciajn lingvojn (E@I kreis kursojn por lerni la slovakon aŭ germanan lingvojn). Duolingo estas unu el tiuj paĝoj. Kion ĝi ofertas kaj kiel ĝi funkcias? Kaj kia estas rilato inter Duolingo kaj Esperanto?



## 9. Trovaĵo el la esperanta vikipedio

La 11-an de majo RP hazardis trovis interesan novaĵon en la esperanta vikipedio.

Sur la paĝo [http://www.auswaertiges-  
amt.de/cae/servlet/contentblob/373556/publicationFile/131097/BundesrepublikDeutschland.pdf](http://www.auswaertiges-amt.de/cae/servlet/contentblob/373556/publicationFile/131097/BundesrepublikDeutschland.pdf)  
legeblas la oficiala nomo de Germanio, nome „Federacia Respubliko Germanujo“ eĉ en Esperanto!

## Anschriften / Adresaro

Redakteur: René Philipp, Pablo-Neruda-Ring 69, DE 17235 Neustrelitz.  
[flustulimu@web.de](mailto:flustulimu@web.de) (Achtung: Werner Pfennig hat diese Aufgabe an René übergeben!)

### Geschäftsstellen

LAMA, Landesverband MV  
DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29/0705  
Tel. 0395 422 13 98

Bankverbindung: Inhaber: Landesverband Mecklenburg Vorpommern des DEB,  
Sparkasse Neubrandenburg-Demmin, KTNR: 320 002 134 8, BLZ: 150 50 200  
e.-Brief: [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)

Esperanto-Verein Neubrandenburg e. V. (EVN)  
DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29 /0705  
Tel. 0395 422 13 98  
e.-Brief: [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)